ELEKTU!

Bonvolu elekti el inter la subaj vortparoj kaj plenigu laŭsence la truojn

aldonante eventuale la finaĵojn!

Alta forno/altforno, altlernejo/alta lernejo, belfloro/bela floro, bluokulo/blua okulo, dikfingro/dika fingro, etfingro/eta fingro, ladskatolo/lada skatolo, nova luno/novluno, ora fiŝo/orfiŝo, seka vinbero/sekvinbero, solinfano/sola infano, sovaĝa besto/sovaĝbesto, vapora ŝipo/vaporŝipo

1) Sako da rosinoj aŭ _____ falis surgrunden. Tie nun kuŝas _____ kaj ili ne estas plu taŭgaj por enmeti ilin en dolĉajojn.

2) En la kermeso la infano gajnis _____ kaj lia fratino belan brakringon kun ornamaĵo, kiu estis _____ .

3) En tiu granda _____ troviĝas pluraj tinusaj _____ .

4) Plorinde! Mi vundiĝis je la _____ pro martelado kaj nun mi havas _____ .

5) Tiu speco de lekanto estas tre _____, mi neniam vidis iun similan! Eble mi malkovris nekonatan floron, kiun mi nomus _____ .

6) Nekredeble! Mi legis en la revuo *Monato* ke oni sukcesis foti novan planedon kaj ĝian _____, sed tiu ĉi lasta apenaŭ videblas pro _____ .

7) Paŭlo, la bakisto, aĉetis tiun uzinon kaj ties _____ por konstruigi grandegan fabrikon por baki en modernaj kaj _____ .

8) Atentu kiam vi manpremas infanojn! Ili havas _____ kaj ilia _____ estas la plej delikata el la kvin.

9) Niaj gefiloj studas ĉe tiu _____ tre fama ĉar ĝi estas la plej _____de la tuta urbo kie oni povas ĝui belegan panoramon.

10) Mi vere timas katojn. Kelkfoje ili estas _____ tre proksimaj genetike al iuj _____ de Afriko, kiel ekzemple leonoj.

11) Tiu blonda viro kun _____ estas profesia boksisto, kiu pro pugnobato nun havas _____ .

12) Granda _____ kun pasaĝeroj malfacile eniris en la havenon pro la multaj _____de fiŝkaptistoj.

13) En tiu klasĉambro estas unu _____ kiu ne havas gefratojn. Li estas _____ .

SOLVOJ

1) Sako da rosinoj aŭ ***sekvinberoj*** falis surgrunden. Tie kuŝas nun ***sekaj vinberoj*** kaj ili ne estas plu taŭgaj por enmeti ilin en dolĉajojn.
2) En la kermeso la infano gajnis ***orfiŝon*** kaj lia fratino belan brakringon kun ornamaĵo, kiu estis ***ora fiŝo***.
3) En tiu granda ***lada skatolo*** troviĝas pluraj tinusaj ***ladskatoloj***.
4) Plorinde! Mi vundiĝis je la ***dikfingro*** pro martelado kaj nun mi havas ***dikan fingron***.
5) Tiu speco de lekanto estas tre ***bela floro***, mi neniam vidis iun similan! Eble mi malkovris nekonatan floron, kiun mi nomus ***Belfloro***.
6) Nekredeble! Mi legis en la revuo *Monato* ke oni sukcesis foti novan planedon kaj ĝian ***novan lunon***, sed tiu ĉi lasta apenaŭ videblas pro ***novluno***.
7) Paŭlo, la bakisto, aĉetis tiun uzinon kaj ties ***altfornojn*** por konstruigi grandegan fabrikon por baki en modernaj kaj ***altaj fornoj***.
8) Atentu kiam vi manpremas infanojn! Ili havas ***etajn fingrojn*** kaj ilia ***etfingro*** estas la plej delikata el la kvin.
9) Niaj gefiloj studas ĉe tiu ***altlernejo*** tre fama, ĉar ĝi estas la plej ***alta lernejo*** de la tuta urbo kie oni povas ĝui belegan panoramon.
10) Mi vere timas katojn. Kelkfoje ili estas ***sovaĝaj bestoj,*** tre proksimaj genetike al iuj ***sovaĝbestoj*** de Afriko, kiel ekzemple leonoj.
11) Tiu blonda viro kun ***bluaj okuloj*** estas profesia boksisto, kiu pro pugnobato nun havas ***bluokulon***.
12) Granda ***vaporŝipo*** kun pasaĝeroj malfacile eniris en la havenon pro la multaj ***vaporaj ŝipoj*** de fiŝkaptistoj.
13) En tiu klasĉambro estas unu ***sola infano***, kiu ne havas gefratojn. Li estas ***solinfano***.